

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Vierter Jahrgang



Nr. 5, Mai 1951

Antaŭ 14 jaroj, en 1937

50 JAROJN ESPERANTO

LA ORJUBILEA UNIVERSALA KONGRESO EN VARSOVIO

Kongresvojaĝo de samideano el „Malpermesitujo“ · De W. Ackermann

Certe nur tre malmultaj gesamideanoj el Germanujo (la tiama „Malpermesitujo“) povis viziti la 29-an, la „orjubilean“ Kongreson de Esperanto en Varsovio, 7-an ĝis 15-an de Aŭgusto 1937. Ni do esperas, ke la sekvanta interesa priskribo de kongresvojaĝo kaj kongresaj travivaĵoj jam per si mem trovos scivolaĵn legantojn. — La verkinto, post sia reveno, estis enkarcerigata de Gestapo pro tio ke li arogis kiel „bona germano“, vojaĝi Varsovion por ĉeesti „judan kongreson“. La aŭtoro havis do okazon, verki sian raporton grandparte en malliberula ĉelo.

Kiam la kalendaro anoncas alvenon de l'printempo, multaj homoj komencas fari planojn por siaj someraj plezuroj kaj vojaĝoj. Ankaŭ mi tre ofte faris tiajn

planojn kaj vidis multajn belajn urbojn kaj pejzaĝojn. Sed de kiam mi esperantistiĝis kaj estis vidinta je unua fojo Internacian Esperanto-Kongreson, mi nur havas ĉiujare la saman deziron: ebligi vojaĝon kun tiu belega celo.

Guste en la nuna malgaja tempo, (1937 — Red.) kiam suspektoj kaj malamo pendigas nubon super la homaro. — kio povas esti pli plezuriga por vera esperantisto, por ĉiu sincera homo, ol trovi sin inter homoj de bona volo, inter samideanoj, kiuj parolas al oni sen pensoj kaŝitaj, sen suspekto kaj malamikeco? Kio povas esti pli plezuriga, ol trovi sin en tiu revata lando, kiun ni nomas Esperantujo? — Kaj en ĉi tiu jaro mi decidis kiel multaj aliaj civitanoj de tiu lando pilgrimi al nia Meko: Varsovio, por festi la Oran Jubileon de Esperanto. Kvankam oni konsilis al mi rezigni la vojaĝon al Polujo en la nuna malfavora tempo kaj pro la grandaj malfacilaĵoj kiuj (laŭ kelkaj opinioj) eĉ ne estus venkeblaj. Sed l'espero, l'obstino kaj la pacienco helpis min atingi la celon.

Fine venis la tago de l'ekvojaĝo: estis vendredo la 6-a de aŭgusto 1937. Dum en antaŭaj jaroj la ekvojaĝoj al kongresoj estis iom solenaj, ĉar kolektiĝis aro da grupanoj kaj aliaj bonvoluloj por akompani la kongresanojn ĝis la vagonaro, en ĉi tiu jaro okazis la ekvojaĝo tute trankvile. Baldaŭ alvenis la internacia vagonaro (Parizo-Varsovio). Trovinte la ĝustan vagonon ni eniris. Poŝtukoj flirtis kiel lasta saluto.

En ĉi tiu jaro ni (mia edzino kaj mi) havis diversajn vojaĝcelojn. La ŝia estis la insulo Rügen. Post Dortmund, starante en la vagona koridoro, mi vidis la unuan verdan stelon sur la brusto de sinjorino. Kun ĝojo mi alvokis ŝin sufiĉe laŭte, ŝi alrigardis min serĉante mian stelon. Jes, mi diris, mi estas vera samideano, sed mi loĝas en Malpermesitujo kaj por eviti malfacilaĵojn mi preferas surmeti ĝin nur post la limo. Si estis svedino ankaŭ survoje kun sia patrino al la kongreso. Aŭdinte de ŝi, ke troviĝas pluraj geesperantistoj en la vagonaro, mi travagadis la tutan vagonaron kaj vere mi trovis anglojn, belgojn kaj nederlandanojn.

Cirkaŭe je la 14-a ni alvenis en Hannover, tra la fenestro ni jam vidis gesinjorojn Fröhlich starantaj sur la kajo atendante nin kaj dezirante, ke mia edzino interrompu la veturadon por restadi kelkajn tagojn ĉe ili. Do ŝi restis en Hannover kaj mi, ricevinte kelkajn konsilojn de s-ro Fröhlich plenumotajn en Varsovio, daŭrigis la vojaĝon. En Berlino prenis lokon en mia kupeo pola kuracisto loĝanta en Varsovio kun kiu mi konatiĝis. Li ne estis esperantisto, sed scipovis bone la germanan kaj francan lingvojn. La ceteraj esperantistoj, kiuj troviĝis en la vagonaro, kompreneble tre ofte venis en

Wer den wucht'gen Hammer schwingt,
Wer im Felde mäht die Ähren,
Wer ins Mark der Erde dringt,
Weib und Kinder zu ernähren,
Wer stroman den Nachen zieht,
Wer bei Wolf und Werg und Flachse
Hinterm Webstuhl sich müht,
Daß sein blonder Junge wachse . . .

Jedem Ehre, jedem Preis!
Ehre jeder Hand voll Schwielen,
Ehre jedem Tropfen Schweiß,
Der in Hütten fällt und Mühlen!
Ehre jeder nassen Stirn
Hinterm Pfluge! — Doch auch dessen,
Der mit Schädel und mit Hirn
Denkend pflügt, sei nicht vergessen.

Ferdinand Freiligrath

Kiu martelegas feron,
Kiu falĉas la spikaron,
Kiu traboradas teron,
Por vivteni l'amataron,
Kiu tiras la ŝalupon,
Kiu plektas ĉe teksilo
Lanon, linon, krispan stupon,
Por ke kresku lia filo . . .

Ilin ĉiujn ni honoru!
Altvaloras kalaj manoj,
Svitgutadon ni memoru
En uzinoj kaj kabanoj!
La plugil' honoras viron.
Laŭran kronon al merito!
Ankaŭ indas li admiron,
Kiu plugas per spirito!

Traduko de Joh. Klerks

Unu el la „Grandaj Figuroj“ . . .

Dum unu tuta jaro EP publikigis ĉiumonate liston de „Grandaj Figuroj“. Mi ĉiam atente legis tiun nomaron kaj devas sincere diri, ke mi trovis en ili multajn nomojn, kiuj por mi ne estis nur, kiel diris Goethe, „sono kaj fumo“. Ne, mi vidis la homojn vivantaj kaj vivantaj kun la tuta aro de iliaj homaj ecoj, kaj el ilia vivo jen tio jen tio inspiris kaj eĉ entuziasmigis min.

Sed pri unu manko mi devas plendi, manko kiu eble ne estis la kulpo de EP, sed pli versaĵne de ĝiaj fontoj, el kiuj ĝi ĉerpis tiujn informojn. En monato Marto mi vane serĉis en ĝi nomon, kiu estas kara ne nur al mi, sed ankaŭ al multaj aliaj, sed kiu, bedaŭrinde, ankoraŭ ne estas sufiĉe konata. Iam, tamen, ĝi estos nomata apud la plej gloraj nomoj; iam, mi estas certa, ĝi troviĝos en ĉiu lerneja libro, en ĉiu instrua libro, en ĉiu scienca libro. Car ĝi signos la viron, al kiu la homaro dankos socian pacon kaj socian justecon.

Vi ankoraŭ ne scias, kiun homon mi celas? Nu, li naskiĝis la 17-an de Marto 1862 en St. Vith, kaj mortis la 11-an de Marto 1950. Lia nomo estas Silvio Gesell. Filo de prusa distrikta sekretario, li fariĝis komerca oficisto kaj poste memstara komercisto en Berlino, Bruns- vigo, Hamburgo, Malago kaj fine en Bonaero (Buenos Aires). Tie li akiris gravajn sciojn kaj konojn sur la kampo de ŝtata mon-ekono-



Silvio Gesell

mio kaj publikigis kelkajn verka- ĵojn ĉi-rilatajn. Poste li akiris kam- pobienon en Svislando kaj fariĝis terkulturisto kaj verkisto, eldonante revuon „La mon-kaj terreformo“.

Post la unua mondmilito oni ofer- tis al li oficon en socialiga komisi- ono de Munkeno. Alveninte tie li eksciis, ke li estas elektita financ- ministro de la respubliko Bavario. La bavaraĵoj estis en kaosa

stato. Gesell komencis sian labo- ron la 8-an de Aprilo 1919. La 14-an sammonate jam estis renversita la tiama bavara registaro, Gesell arest- ita kaj akuzita. Pro plena senkul- peco oni baldaŭ reliberigis lin. Li mortis en Eden apud Berlin.

Lia ĉefverko estas „La natura ekonomia ordo“. Pri ĝi diris:

Paul E. Anderson, profesoro de nacia ekonomio en Novjorko: „La natura ekonomi-ordo“ de S. Gesell estas unu el la plej gravaj verkoj de l' mondo.

Prof. Dr. Soddy, Nobel-premiito, ĉe la universitato de Oksfordo: „La voĉo de S. Gesell eksonis sur la kontinento kiel el sovaĝejo, multajn jarojn antaŭ ol alia ekkonis tiujn vivgravajn interesojn de la ho- maro.“

John Maynard Keynes, mortinta direktoro de la mondbanko de Bret- ton Woods: „La estonteco lernos pli el la spirito de Gesell ol el tiu de Marx.“

Tio sufiĉu kiel malgranda sed grava kontribuajo al la lastfoja apero de „Grandaj Figuroj...“.

F. Hölzgen

Älterer Herr sucht . . .

So beginnt manche Heiratsanzeige. Handelt es sich nun um einen Herrn mit leicht ergrauten Schläfen oder um einen Zittergreis? Das Wort „älter“ besagt an sich nicht das, was wir hier darunter verstanden wissen wollen.

Esperanto ist kein Delphisches Orakel, sondern sagt klar, was es meint. Dr. Zamenhof hat uns tref- fende, sinngemäße Übersetzungen gegeben: älterer Herr = *nejuna sin- joro*; dementsprechend ist eine jün- gere Dame eine *nemaljuna sinjorino*. Das deutsche „älter“ ist hier eine Scheinsteigerungsform; es wäre also sinnlos, im vorliegenden Falle von einem *pli maljuna viro* zu reden. Älter = ziemlich alt; über ein ziem- lich altes Auto = *nenova aŭto* wird keiner raten müssen, was darunter zu verstehen ist. Es mag nun jeder schätzen, wie alt der Herr bzw. das Auto ist.

M. Butin

Sidiĝi sur seĝon?

Verleitet durch das deutsche „sich auf einen Stuhl setzen“, schreiben manche *mi sidiĝis sur seĝon*. Das ist falsch. Abgesehen davon, daß *sidiĝi* ein Esperantismus ist, und jeder, dem es um ein gutes Esperanto zu tun ist, *sidiĝi sin* setzen wird, über- sieht man, daß *iĝi* an ein nichtzie- lendes (intransitives) Zeitwort ge- hängt, die Bedeutung *veni en la sta- ton de...i* hat, in unserem Falle also *sidi*. Sitze ich nun „wo“ oder „wohin“? *Mi sidas kie* bzw. *tie*, auf dem Stuhl = *sur la seĝo*. *Veni en la staton de sidi* = *iĝi sidanta*. Bei *starigi* (besser *starigi sin*) verhält es sich genau so. Den Unterschied zwi- schen *sidiĝi* und *eksidi* kann man so fassen, daß *ek-* da anfängt, wo *iĝi* aufhört. Ein feines Sprachgefühl ist oft unerlässlich.

M. Butin

LINGVA KONSILEJO

Aktuala Terminareto

(S) = Schulwesen

Ausläufer (eines Tiefs): branĉo.
 Aufbauschule (S) talentul-lernejo.
 Anschauungsunterricht (S) instruado intua.
 Blutprobe sang[es]ploro; ~ okvanteto.
 „büffeln“ (S) lern[egi], ~ adi, ~ aĉi diesig malklarena
 Fachschau fakekspozicio
 Fehlhandlung (Psychologie): glit- eraro, misago.
 fensterln fenestroviziti.
 frei geben (S) doni ferion.
 Ganzheitsunterricht (S) instruo laŭ tutoj.
 Gedächtnisstütze memorhelpo.
 Geldüberhang troo da mono
 Handarbeitsunterricht pinglolabora fako, instruo
 Hemmungen haben havi psikajn malhelpojn, sin ĝeni
 das Hoch(druckgebiet) areo de alta premo. Azoren ~ alta premo ĉe la Azorj
 Klassenarbeit (S) ektemporala. ~spiegel sidplano
 Knäckebröt krakpano
 Modenschau modmontr, -parado
 Pfuschzettel (S) trompslipo

„Pons“ (S) tradukhelpo, kaŝtraduko
 Randstörungen (Wetterkunde): ran- daj perturboj
 rund 1000: rond(nombr)e 1000. ~e
 Zahl ronda nombro. ab ~en 1. ron- digi, 2. rondigi malsupren. auf- ~en rondigi supren
 Runde (Sport) etapo, (Stammtisch) trinkaĵo por ĉiuj
 Richtstrahler, Richtungsantenne di- rektanteno (senda aŭ riceva)
 schulfrei ferio, senleciona tago.
 ~speisung lerneja manĝado, -aĵo
 „schwimmen“ (S) esti necerta
 schwatzen (S) subparoli, flustri
 Staubsauger polvosorbilo
 Stromlinienform flu(lini)a formo
 Studio 1. filmfarejo, 2. teatro, 3. (Rundfunk) teknika kontrolejo
 Tauchsieder mergoboligilo
 das Tief(druckgebiet) areo de mal- alta premo
 Tiefenpsychologie profund-psikolo- gio
 umlaufende Winde tufniĝantaj ven- toj
 verminen minumi
 volkseigen naci[apartena, popol- Werkunterricht, Werken (S) manla- bora fako, instruo
 Wochenschau aktualaĵoj, semajn- revuo.

Hans Wingen

Fumo

De P. Muñoz Seca · El la hispana tradukis José Fernando Berenguer

Angulo de l'Retiro*), la plej kaŝita, kiun serĉas la enamigintoj, por karespetoli. Benko krudforma piede de diktrunka arbo. Estas tage, nuntempe.

Benítez kaj González

(du maljunuletoj simpatie aspektantaj, kun afablaj vizaĝoj kaj sufiĉe eluzitaj vestoj. Benítez estas... la famkonita Benítez, aktoro kiu siatempe frenezigis la publikojn. González estas... la genia González, verkisto aplaŭdegita antaŭ duona jarcento. Ili eniras de dekstre kaj per malrapidemaj paŝoj; kun klinitaj fruntoj kaj senparolaj lipoj ili sin direktas al la supre menciita benko troviĝanta en la fundo.)

Benítez: Rigardu, ĉi tie ni sentos nin tre bone: varma suno, beleta pejzaĝo kaj sidloko taŭga por idilio.

González: Vi estas prava.

Benítez (metante sur la benkon larĝan poŝtukon kaj montrante ĉe tio la tre flikitajn sidpartojn de siaj eluzitaj pantalonoj): Ni zorgu la vestojn!

González: Nu jes, vi ne konformiĝas detrui nur la pantalonojn; plaĉas al vi samtempe detrui ankaŭ la naztukojn.

Benítez (grumblante): Bone! Pli bone! Mi faras, kion mi volas.

González: Tio min koncernus same, kiel se vi volus submeti la ĉapelon. (Eksidante kun peno kaj vekriante laŭ la kliniĝo de l'korpo): Aj!... Aj!... Aj!

Benítez (duonĝenate, duonkompatante): Kio! Ĉu ne pliboniĝis tiuj doloroj?

González: Tute ne! (Palpante la dorsfinon): Tiu malbenita lumbago min frit-turmentas.

Benítez: Lumbago? Kio estas tio? Kio estas lumbago?

González (per iom neafabla tono): Lumbago, homo! Jam per tio ĝi estas dirita! Doloro tre pika ĉi tie en la lumbaj vertebro. (Palpas.)

Benítez: Ha! En la renoj!

González (malĝentile): En la renoj ne! En la lumba regiono, kio ne estas la samo.

Benítez: Vi, por nomi regiono iun ajn korparton, frenezetiĝas.

González: Iru, por ke oni vin mielumu!

Benítez: Regiono! Vidu kia regiono; Ĉu al vi doloras ĉi tie? Do tio estas la afero sentebla, la cetero malmulte gravas.

González (ĉagrenetite kaj dezirante fini tiun diskuton): Bone, homo, bone.

Benítez (supere): Kiam al mi doloras ĉi tie (frunte), mi diras, ke doloras al mi la kapo; kaj kiam al mi doloras ĉi tie (frapetante sian kap-postaĵon), mi diras ankaŭ, ke al mi doloras la kapo, ĉar ĉi ĉio estas kapo**).

González (malestime): Tion vi ja volus!

Benítez: He?

González: Se ĉio ĉi estus kapo, vi ne vidus vin, kiel nun, sen familio kaj en mizero.

Benítez: Pli malbone mi status en mizero kaj kun familio.

González: Ne. Elturniĝoj al vi ne mankas.

Benítez: Nu!

González: Mi ne scias kial vi ne hontas: La

gloraĵo de jarcento, la unua el la aktoroj de tuta epoko vivas preskaŭ per almozoj. Kaj ĉio pro malŝparo, pro malkonservemo, pro nepensemo. Ba! Montriĝas: La aktoroj voloras sur scenejo; ekster ĝi ili estas — nulaĵoj!

Benítez (atake): Kaj la verkistoj kiel vi — neniaĵoj interne kaj ekstere de scenejo.

González: Benítez!

Benítez: Kial ne ŝparis vi? Ĉar ankaŭ vi havis viajn jarojn de bonstato!

González: Ba! Mi ne volas paroli.

Benítez: Vi ne povas paroli! (González grumbblas.) Mi estas malriĉa: bone. Kaj kio do? Sed mi estas mi. Pli ol unu vulgara riĉulaĉo donus la duonon de sia havaĵo por promene porti ĉi tiujn glorajn mizerajojn, aŭdante kiel la homoj diras: Tiu estas Benítez! Jen iras Benítez! Benítez! Kia granda aktoro estis Benítez!

González (flanken): Iluziulo! Kvazaŭ iu ankoraŭ memorus pri Benítez!

Benítez: Spari! La ŝparado supozigas egoismon, spiritan malgrandecon. Pensi pri la estonteco estas malpermesite al tiuj, kiuj bezonas sian tutan cerbon por rigardi la estantecon. Spari! Se ni estus ŝparintaj, alia estus nia vivkondiĉaro, kaj ni ne estus, kio ni estas.

González: Kio ni estis! (Post tus-atako, fermbutonumante la jakon). Devi pensi, ke mi havis dek-unu surtutojn en mia ŝranko, kaj nun, kion mi povas surmeti? Eĉ ne la ŝrankon! (Tusas.) Kaj ne kredis ke min timigas la malvarmo; tio estas la plej malgrava. Min ruĝigas ke oni kutimas diri min vidante: Tie iras González, la verkisto! Kaj kiel iras la bedaŭrindulo!

Benítez (flanken): Naivulo! Kvazaŭ iu ankoraŭ memorus pri lia nomsanktulo. (Malgranda paŭzo.) La vivo, knabo, la vivo!

González: Kio? Ĉu vi vidis sinjoron Remigo?

Benítez: Jes; sed... nenio.

González: Maldankemulo! Impresario riĉiĝinta je mia kosto.

Benítez: Je via kosto?

González: Ĉu vi volas nei, ke li ekspluatis mian repertuaron?

Benítez (atakeme): Kaj kio fariĝus via repertuaro sen mi?

González (atakeme): Kaj kio fariĝus vi sen mia repertuaro? He? Kiu konatigis vin? Kiu vin igis fama? Respondu! Miaj verkoj!!

Benítez (ironie): Bonaj estas viaj verkoj!

González: Ne vi taŭgas por ilin prijuĝi.

Benítez: Tio estas alia afero. Kvazaŭ ni aktoroj ne havus kriterion pri tio, kie ĝuste ni devas havi tion. (González grumblas.)

González: Tamen, ne, sinjoro, vi ne havas ĝin.

Benítez: Memoru pri la unua prezentado de „La piramidoj“: tre klare mi diris al vi: González, La Piramidoj pezas multe! González, en la dua akto ili disfalis. Kaj ili disfalis, jes, sinjoro. Signifoplena siblado bloviĝis al vi!

González: Al ni!

Benítez: Al vi, kaj tutprave, ĉar vi havis versojn, kiuj ŝajnis esti faritaj en rubejo. (Deklamas kun moko kelkajn malmalmodernajn versojn.) Jen kia rimajo!

González: Pli malbona estis via puŝfalo, kiam vi supreniris la ŝtuparon. Ankaŭ vi ricevis vian parton.

Benítez (kolertreme): Mi? Mi — puŝfalas?

González: Vi, jes, sinjoro, vi!

Benítez: Povas esti. Ĉar estis tiom da rubo en la sceno!

* konata parko en Madrido.

** „Kapo“ en hispana lingvo signifas ankaŭ „saĝo“.

González (minace): Benítez! (Tusas.)
Benítez (provokante lin): Kio estas? ... (Tusas ankaŭ)

González: Vi ne havas la kulpon, sed mi kiu aŭskultas viajn impertinentaĵojn. Kial, anstataŭ paroli al mi pri La Piramidoj, vi ne parolas pri miaj ceteraj sukcesoj?

Benítez: Miaj!

González: Viaj! Ĉiam kredas la aktoroj, ke la aplaŭdoj estas al ili kaj por ili.

Benítez: Kaj tiel estas.

González: Laŭ via fantazio! Deklamu sur la scenejo la Patro Nia'n; ni vidu, ĉu oni vin aplaŭdos. La aplaŭdo estas por la aŭtoro, por la elpensinto, por la kreinto.

Benítez: Kaj la aktoron trafu la fulmo!

González: Ke ĝi trafu lin! La aktoro estas nenio kaj neniu; iu sinjoro kiu parolas ial; sed, kompreneble, tial ke li staras antaŭ publiko, li salutas, kiam la publiko aplaŭdas. Ankaŭ salutas la dresistino, kiam la fokoj faras jonglaĵojn, kaj eĉ kredas, ke la aplaŭdo estas por ŝi.

Benítez: Kiom da sensecaĵoj vi diras!

González: Ĉi tio ne signifas diskuti. Argumentojn, argumentojn!

Benítez (ironie): Ne. Ĉar kiam Tita Ruffo kantas Rigoletto'n, la publiko aplaŭdas Verdi'n.

González (same): Ne. Ĉar kiam ili vidas la „Bobo de Coria“*) de Velázquez, ili admiras la Stultulon.

Benítez: Jen, kio vi estas: stultulo.

González: Kaj vi idioto.

Benítez (kolertreme): Tiun ĉi vorton vi ne diras al mi du fojojn!

González: Kial ne? Dirinte ĝin unu fojon...

Benítez: González!

González: Kio? Kio estas?

Benítez: Tio ankoraŭ mankus!

González: Tion diras mi: Tio ankoraŭ mankus!

Benítez (post mallonga paŭzo): Fulmotondro! En tago, kiam vi havas nenion por manĝi, nek tabakon, vi kondutas tiel, ke verdire neniu povas vin elteni.

González: La afero ja ne igas danci.

Benítez: Jes, sed...

González: Ĉu vi havas?

Benítez: Monon? Eĉ ne unu realon**)!)

González: Kaj cigaredojn?

Benítez: Unu.

González: Ĝi estu por vi ĝuoj!

Benítez: Rigardu! (Montrante al li bonan cigaron de Kubo.)

González: Cigaro!

Benítez: Kaj bona! Oni donacis ĝin al mi hieraŭ. Mi gardis ĝin por fumi post la manĝo, sed konsiderante ke la afero de l'hodiaŭa manĝo fariĝas tiel malfacila...

González: Ĉu vi nun fumos ĝin?

Benítez: Jes.

González: Bone. (Li turnas al li iom la dorson, kvazaŭ por ne suferi la turmentegon de Tantalo, kaj sopire enspiras. Benítez lin rigardas, ridetas, eligas tranĉileton kaj distranĉas la cigaron en la mezo.)

Benítez (oferante al li duonan cigaron): Prenu!

González (kurtuŝite): Ĉu? Benítez!

Benítez: Fumu!

González: (prenante la parton de la cigaro): Dankon!

Benítez: Vi kredis, ke mi fumos ĝin sola.

González: Ne!

Benítez: Jes!

González: Pardonu min! (Ili ambaŭ bruligas kaj fumas kun vera ĝuego. Iiaj vizaĝoj transformiĝas; ŝajnas ke ili enspiras ne buŝplenojn da fumo, sed buŝplenojn da ĝojo. Kompatindaj maljunuloj!)

Benítez (tre kontentigite): Aŭskultu! En kiu benefica prezentado vi donacis al mi skatolon kun cent Havanaj cigaroj? Ĉu estis en la jaro, kiam ni unuafoje prezentis „Juegos de amor“*)?

González: Ne, homo. La jaro de Juegos de Amor estis la jaro de la ŝerco: mi donacis al vi toreadoran veston, ĉar vi estis enamiginta je tiu Conchita Becerra, kiu vin irigis eĉ surkape.

Benítez: Estas vere.

González: Cetere, la ŝerco gustumis al vi malbonege, ĉar tial ke estis ŝi, kiu vin toreadoris... La jaro de la cigaroj estis, kiam ni debutis „El conde Enrique“.**)

Benítez: Jes, nun mi rememoras.

González: Jam sufiĉe da pluvo falis de tiam.

Benítez: Kaj eĉ tondris, kio estas pli malbona.

González (memorante): „La grafo Henriko“! Ĉu vi memoras?

Benítez (same): Kia verko estis tiu!

González: Kian verkon vi faris, Joĉjo!

Benítez: Ĉar tiu grafo diris grandiozaĵojn, Rafaelo!

González: Kia sukceso!

Benítez: Kia sukceso!

González: Longan tempon vin nomis Henriko la tuta mondo.

Benítez: Estas vere. Ĉu vi memoras pri mia sceno kun la reĝo, kiam mi ĵetis al liaj piedoj tiun manplendon da moneroj?

González: Kia ovacio!

Benítez (deklamante): Se estas ĝi almoz', sinjor', rigardu mian faron!

González: Kiel bone vi ĉiam forĵetis la monon. Joĉjo. Tial de post tiu nokto ni nomis vin Henriko.

Benítez: Tiu sceno elektrumis la publikon.

González: Kiel ili vin aŭskultis, kiel ili sekvis viajn vortojn, viajn gestojn!

Benítez (elvokante la rememoron): Jes. Kun la korpaj antaŭen klinitaj, duonmalfermitaj buŝoj, brilaj okuloj kiel en febro, kaj en la okuloj larmoj, kaj en la larmoj lunkisoj... Kaj tiu inkuba silento, tiu fajra blovo...! La silento de singultado, kiu ne eligas kaj la fajro de larmoj, kiu ne falas el la okuloj. Kaj mi supre, sursceneje, antaŭ kortego min admiranta, ĵetante manplendon da moneroj al la piedoj de reĝo min ofendinta — „Se estas ĝi almoz', sinjor', rigardu mian faron!“

González (kurtuŝite): Kaj poste!

Benítez: Poste... la eksplodo tondranta, la ovacio deliranta, la aplaŭdo entuziasma! Kiomfoje mi aŭskultis tion plorante! Kaj vi... kiomfoje, kiam mi tiris vin, por ke vi partoprenu ĉion, vi ploris ankaŭ... Same kiel vi ploras nun. Same kiel ni ploras nun ambaŭ! (Sufokas singulton.)

González (ĉirkaŭprenante lin kun emociego): Joĉjo!

Benítez: Rafaelo!

González: Kiaj estis tiuj tempoj! Kio estis ni!

Benítez: Kaj kio ni estas nun! Ankoraŭ estas!

González (malĝoje): Jes ja!

Benítez: Ankoraŭ oni nin konas kaj admiras; ankoraŭ oni turnas la vizaĝon por nin vidi, kiel iam.

González: Kiel iam ne! De tiom da larmoj entuziasmaj ne restis eĉ unu sola de kompato. Vi ja vidas: Hodiaŭ ni ne manĝis ankoraŭ; eble ni restos ne manĝinte.

Benítez: Dio malfermos al ni pordojn. (Maldekstre eniras la scenejon Johano kaj Henriko; ili estas junaj, elegante vestitaj, kaj alvenas vikle interpolante.)

Henriko: Vi povas min kredi: mi tremas kiel infaneto.

Johano: Mi tion komprenas.

Henriko: Si diris al vi, ke ŝi venos, ĉu ne?

(Finota)

*) Stultulo de Coria

**) Kvaronpeseto

*) Amludoj

**) Grafo Henriko



En Majo

Teksado kaj formado,
kreskado nehezita —
ho mond', de kiaj fortoj
vi estas ekkaptita!

Naturo estas tuta
en feliĉega stato
en gaja ornamajo —
Ho bela maj-monato!

Florado kun parfumo,
verdado en sunbrilo.
La tero eĉ petolas
pro ĝoja maltrankvilo.

Ho mia koro, hontu!
Forgesu pri doloro!
Vi estas nekonforma
al tiu brila horo!

Dr. Rupert Scheucher



Neŭigiteco aŭs der Esperanto-Welt

Esperanto-Gegner vergebens gesucht

Es gibt keine sachlich begründeten Einwendungen gegen die internationale Sprache Esperanto, erklärte Dr. Siegfried Ziegler im Amerika-Haus-Forum München. Weder das bayerische Kultusministerium noch der Philologenverband haben dem von ihm geleiteten Deutschen Esperanto-Institut an der Universität München einen Esperanto-Gegner namhaft machen können.

Gewerkschaften und Esperanto

Die Bildungsarbeit der Gewerkschaften berücksichtigt seit langem Esperanto, denn den zumeist einsprachigen Arbeitnehmern wird durch die internationale Sprache die Verbindung zu den Kollegen in aller Welt ermöglicht. Doch nicht nur dem persönlichen Gedankenaustausch dient Esperanto, sondern es wird auch als Konferenz- oder Korrespondenzsprache in der internationalen Gewerkschaftsarbeit verwendet. Studienlager für esperantokundige Gewerkschaftler verschiedener Länder finden wieder statt. Einige Gewerkschaftsverbände, darunter der holländische N. V. V., geben regelmäßige Informations-Bulletins in Esperanto heraus. Verbundenheits-

adressen anlässlich des 1. Mai wurden auch in diesem Jahre wieder zwischen Gewerkschaftszentralen verschiedener Länder über die Sprachbrücke Esperanto ausgetauscht. Für die Esperanto-Verwendung in den internationalen Arbeiterorganisationen setzt sich besonders Mr. Mark Starr, bekannter Gewerkschaftsführer der nordamerikanischen Textilarbeiterbranche ein. Viele Gewerkschaften, auch der DGB, haben die Eingabe an die UN zwecks Einführung von Esperanto unterstützt.

Bayerische Esperanto-Bibliothek

Die Bayerische Esperanto-Bibliothek in Klingenberg am Main, eine der größten im Bundesgebiet, die bisher in einer Berufsschule behelfsmäßig untergebracht war, wird am 9. Mai in eigenen Räumen neu eröffnet.

Edmund Privat hält Festrede

In der Feierlichen Eröffnung des 36. Esperanto-Weltkongresses in München am 5. August wird der Schweizer Universitätsprofessor Dr. Edmund Privat die Festrede halten.

Diplomatischer Dienst

Das britische Außenministerium hat bisher vier offizielle Esperanto-Kurse für Angehörige des Gesandtschaftspersonals im Ausland veranstaltet.

Der bayerische Staatsminister für Unterricht und Kultus, Dr. Josef Schwalber, hat das Ehrenprotectorat über den 36. Esperanto-Weltkongress übernommen zu dem bereits vierzehnhundert Anmeldungen aus zweihundredreißig Ländern vorliegen.

Spirale und Wendel

Spirale heißt auf Esperanto spiralo und Wendel helico; aber das nützt uns gar nichts, denn schon im Deutschen weiß man nicht, was eine Spirale und eine Wendel richtig ist.

Eine Spirale ist eine Kurve in einer Ebene, so ein Kringlehen, das sich im Kreise immer näher an den Mittelpunkt heranschlingelt. Die Wendel dagegen heißt mit dem alten Namen Schraubenlinie: sie liegt nicht in einer Ebene, sondern geht im Raum hoch wie ein Korkzieher oder eben wie eine Wendeltreppe.

Bei der Spirale hat wohl jeder gleich gesagt: Schneckenlinie, und das ist ja auch der gute deutsche Name für Spirale. Aber ich habe absichtlich die Schnecke herausgelassen, denn hier liegt der Haken und der Grund, warum Spirale und Wendel so durcheinandergeraten. Wenn man ein Schneckenhaus von oben besieht, hat man unzweifelhaft eine Spirale; aber von der Seite betrachtet, hat ein Schneckenhaus doch eine Ähnlichkeit mit der Schraubenlinie: es geht ja auch im Raum hoch um eine Mittelachse herum, um die Spindel im Schneckenhaus.

Im Esperanto heißen übrigens die Gehäuseschnecken helikoj: da sieht man auch, woher helico = Wendel kommt.

Sind jetzt alle Klarheiten beseitigt? Also Wendel = helico, Wendeltreppe = helica ŝtuparo. Der Spiralbohrer ist nicht spiralgig, sondern wendelig, also: helica borilo! — Heliko = Gehäuseschnecke, helika konkono = Schneckenhaus.

Sehr wichtig war das Ganze nicht, — nur eben spaßig, daß das Durcheinander von der Schnecke herrührt.

H. U. A.

TRADUKTASKO 19

Ci-foje la traduktasko estas ne-modifita gazet-artikolo kaj malfacila. Ni turnas nin kun ĝi ĝuste al la jam spertaj esperantistoj. La tasko montras al ili kampojn, sur kiuj la vortaro de la lingvo devos esti ankoraŭ prilaborota. Ankaŭ la gazetara stilo ne estos tute simple tradukebla. Tamen — ne timu, sed provu!

Por la tri plej bonaj tradukoj ni disdonas tri premiojn:

1. Vortaro de Christaller, 2. Jar-kolekto 1950 de EP bindita, 3. Esperanto in der Tasche. Ce samvaloraj tradukoj decidis la loto. Lasta tem-plimo por sendo: 30-a de junio 1951.

„Kölnische Rundschau“ vom 25. 3. 51

USA-Riesenflugzeug vermißt

Wahrscheinlich bei Sturm ins Meer gestürzt — Flugzeuge dreier Nationen suchen bisher vergeblich

London, 23. März. (ap) Ein Riesen-transportflugzeug der amerikanischen Luftstreitkräfte vom Typ „Globemaster II“ wird seit Freitagmorgen über dem Atlantik

vermißt. Rettungsflugzeuge dreier Nationen, der USA, Irlands und Großbritanniens, haben sofort die Suche nach der verschollenen Maschine aufgenommen, die wahrscheinlich zwischen Island und Großbritannien in die stürmische See gestürzt ist.

An Bord der Maschine, die auf dem Flug von Limestone (Maine) nach Mildenhall in England war, befanden sich einschließlich der Besatzung 53 Angehörige der amerikanischen Luftstreitkräfte, darunter ein Brigadegeneral.

Nach der letzten Standortmeldung befand sich das Flugzeug an der Strecke Neufundland — England noch rund 1500 km von der irischen Küste entfernt. Der Pilot berichtete, wegen des Sturmes und des Nebels voraussichtlich mit 40 Minuten Verspätung in Mildenhall einzutreffen. Die letzte Funknachricht wurde um 2 Uhr morgens aufgenommen. Seit 7 Uhr ist das Flugzeug als überfällig gemeldet. Da jede „Globemaster“-Maschine über Rettungsschlauchboote mit eingebauten Wasser- und Verpflegungskammern verfügt, besteht noch die Hoffnung, daß die Insassen des Flugzeugs gerettet werden können.

La Nekonatino * Novelo

Aŭtorizita traduko el la germana lingvo de Ludwig Goppel

(Fino)

Kun levita kapo ŝi iris tra la ĉambroj, mallaŭte malfermis la pordon, paŝis tra la malhela koridoro, staris antaŭ la pordo, metis la manon sur la malvarman anson. Nun ŝia kapo malleviĝis sur la bruston. „Ne, Thomas Bentick, same kiel mi kredas pri vi, ankaŭ vi kredu pri mi, hodiaŭ kaj dumvive.“

Paŝon post paŝo ŝi mallaŭte reiris, enlitiĝis, kaj lasis preterpasi la senfine daŭrantajn minutojn de ĉi tiu nokto kun la unusola tento, kaj ĉiu unuopa minuto estis turmento, allogo kaj kompliko. Frue en la mateno ŝi aŭdis de la ŝtuparo malsuprenveni William'on kaj ankaŭ ŝi ellitiĝis.

„Hodiaŭ mi mem preparos la kafon kaj matenmanĝon por lia lorda moŝto, vi havos sufiĉe da aliaj taskoj, Mister William.“

Li klinis sin kaj foriris. Unu horon pli poste venis Thomas kaj longe rigardis en ŝian vizaĝon.

„Tute ne pala vi estas, mia kuraĝulino.“

„Kiel nedankema tio estus, Thomas, kontraŭ Dio kaj kontraŭ vi.“

Antaŭe, neniam ŝi ŝminkis sin.

Pli poste venis la aŭtomobilo, luita veturilo. Tiuj de la lordo staris en la garaĝo; estis venditaj al tiu, kiu enloĝiĝos ĉi tie post du semajnoj.

„Vi devas iom manĝi, Thomas.“

„Kaj vi?“

„Tiel frue mi nenion povas toleri en la stomako . . . Poste mi preparos ion por mi sen maltrankvilo. Vi ja kortuŝe antaŭzorgis, mi vidis ĉion en la manĝaĵejo.“

„Tien mi metis por vi la vinon de hieraŭ vespere . . . Haut-Sauternes-vinon, trinku ĝin hodiaŭ vespere je mia sano.“

„Cu du botelojn?“

„Nu, iom post iom, vi ja scias.“

„Mi komprenas vin . . . iom post iom.“

„Jen la aŭtomobilo!“

„Thomas, estas urĝa tempo.“

Ili estis en la brakoj unu de la alia. Li deŝiris sin, revenis.

„Madeleine!“

„Thomas!“

Kune kun li ŝi malsupreniris la malgrandan ŝtuparon, prezentis la manon ankaŭ al William. Kial la bonkoraj okuloj de la maljunulo rigardis ŝin tiel ekzamene? La motoro ektratis.

„Addio Madeleine!“

„Bonan vojaĝon, Thom!“

Tiam ŝi iris tra la ĝardeno kaj postrigardis la aŭtomobilon, kiu malrapide malaperis. Mekanike ŝi fermis la ĝardenpordegon kaj iris en la domon.

Madeleine Lavin estis sola. Si sidis ĉe la labortablo, kvazaŭ vidis la amaton antaŭ si. Siaj okuloj rigardis senesprime, la larmoj foriĝis dum la nokto. Subite ŝi ektimiĝis: la telefono!

„Cu vi, Thom? Jen . . ., bonan sidlokon vi akiris? Kiel mi povus forgesi vin . . . Je la deka vespere ekveturos la ŝipo? . . . Nature mi pensos pri vi . . . Addio, Thomas, addio!“

La aŭskultilo falis sur la forkon.

„Addio, Thomas Vernon Bentick.“

Nekonscie ŝi ĝustigis la malrekte falintan aŭskultilon.

Ekstere brilis la suno, birdoj kantis en la tilioj, ĉio estis kiel kutime. Malrapide ŝi starigis sin, forprenis la ilaron de la matenmanĝa tablo, iris en la kuirejon, lavis la vazaron, metis ĉiun objekton al ĝia loko kaj ĉirkaŭrigardis. Cie estis ordo. Ŝi reiris. Jen staris du boteloj da vino.

La irado ŝtuparusupren estis malfacile por ŝi. William estis ĉion ordiginta kaj freŝe tegis la litojn. Guste, tion ŝi ankoraŭ devis fari pri sia lito. Ĉi tie Thom estis dorminta, antaŭ ĉi tiu pordo staris hieraŭ nokte Madeleine Lavin. Ŝi ridetis kaj iris en sian ĉambron. Ankoraŭfoje ripozi, dormadi. Ŝi posedis dormigilon. Kie ĝi troviĝas? Nature, malsupre en la kofro. Du tablojdojn ŝi glutis kaj profunde ekdormis.


Je la naŭa vespere ŝi vekigis. Spirite ŝi vidis iri lin sur la ŝipon kiel tiutempe kiam li staris apud Janet Mary Jones. Sia kapo doloris, malrapide ŝi devigis sin, fortiri la littegaĵojn kaj meti ĉion en lavajkeston, kiel bona mastrumantino plenumas tiajn aferojn, pakis siajn du malgrandajn kofrojn kaj portis ilin en la subtegmentejon. Nenio troviĝis en ili, kio povis malkaŝi ion. Tiam ŝi iris malsupren. Dormigilojn ŝi posedis ankoraŭ multajn. Tiujn ŝi volvis en sian tukon. Rigide rigardante, pensmalplene, nura vivaĵo ĉirkaŭ malforte batanta koro, ŝi trinkis unu botelon de la dolĉa, forta vino.

„Je via estonteco, Thomas, je via sano!“

Lia ŝipo jam devis esti forlasinta la havenon. Ŝi formetis la botelon, purigis la glason, metis ĝin en la ŝrankon kaj estingis la lumon. En la koridoro ŝi prenis la ĉapelon. Malsupre ŝi malfunkciigis la ĉefan komutilon, ŝlosis la pordon kaj ĵetis la ŝlosilon tra la fendo de la leterkesto. Ek de la Bastille-Placo ŝi veturis per la tramo al Charenton. La teraso, sur kiu ŝi estis sidinta kun Thomas, estis hele lumigita. Ŝi iris malsupren al la bordo, rigardis supren kaj vide retrovis la lokojn de ili ambaŭ. Neniu sidis apud la tablo. Sola kune kun ŝi li estis ĉi tie ĉe sia preferata loko. Ŝi englutis la pulvorojn kaj sidigis sin. Pri Pertuis ŝi sciis nenion plu. Ĉio estis forgesita. Ŝi vivis en plena soleco de l' animo. Pri Parizo ŝi ne pensis. Nur la mallaŭtan plaŭdadon de la rivero ŝi aŭdis proksime de si kaj vidis akvoprofundajon kaj konstante sonis voĉo: „Mia malgrandulino!“ Infanece ŝi ridis al la celo de sia sopiro. „Thomas Vernon Bentick“, ŝi pensis. Ĉi tiu nomo por ŝi signifis ĉion. La

ATOM-ENERGIOJ DE L'ANIMO

La sukces-skalo



La vivspertoj de la grandaj, prosperintaj homoj en ĉiuj landoj pruvas, ke estas eble, sub ĉiuj vivkondiĉoj majstri la malfavorajn cirkonstancojn kaj fariĝi sukcesulo. Ĉiam la for-aŭ subigo de malfacilaĵoj ĉefe dependas de jesa interna konduto kaj fidema sintenado rilate al la vivo kaj de konscia mobilizo de la „atom-energioj de l'animo“: de la volforto, de l'kredo kaj fido, de la pensoj kaj deziroj.

Cu nia ĝenerala spirita sinteno estas pozitiva kaj sukcesgarantianta aŭ ne, tion ni mem ĉiam denove povas konstati, esplorante nian animstaton pere de la ĉi-supra sukces-skalo, kiu montras, kiom da procentoj de nia interna forto aŭ „sukcesenergio“ jam aktivigis. Car nian vivsukceson plejparte decidas la speco de niaj ĉiutagaj — jesaj aŭ neaj — aŭtosugestoj kaj volimpulsoj.

Bonvolu ekzameni helpe de la ĉi-supra sukces-skalo, kian energievolution vi akiris ĝis nun laŭ la pensoj kaj sentoj superregantaj en viaj konscio kaj subkonscio. Poste vi scios, kie vi nepre komencu vian medekadon kaj memregadon, por atingi la decidigan finan sukceson. Ĉiu pli alta ŝtupo esprimas iom pli grandan amplekson de l'aktiveco de viaj internaj fortoj.

Kaj nun ni rigardu la unuopajn sukcesenergi-ŝtupojn:

„Mi ne emas!“

= 0 % de nia sukces-energio

Pensante tiamaniere oni malsukcesas en preskaŭ ĉiuj entreprenoj. Car ascendo al la suproj de l'vivo estas neebla, se volo kaj emo mankas, t.e., se ili ankoraŭ dormadas. Tiu negativa sinteno konformas al tiu de vivlaculo, kiu pensadas: „Al mi neniu kaj nenio povas helpi!“ — Sed kiam tia homo senhezite sia falegigus en la oceanon de l'vivo pensante: „Guste tial! Nun nenio min plu povas timigi!“, povus okazi, ke la vivo prezentos al li novan ŝancon, kiu lin prosperigos, se, en tiu decidiga momento, li fidos tiel la vivon kiel ankau siajn internajn fortojn. — Bonvolu mem provi tion!

„Mi ne povas!“

= 10 % de nia sukces-energio

Ĉiu timnaskita neo de l'kapablo estas senbaza memkondamno al malplivaloreco. Efektive neniam mankas la povo, sed nur la kuraĝo aŭ memfido. Malantaŭ ĉiu „Mi-ne-povas“-penso sin kaŝas la superstiĉo, ke la malhelpaĵo estas pli potenca ol la propra sukcespovo. Nur pro tio oni malsukcesas, kie oni nepre venkus fidinte al si mem. Estas multe pli danĝere, tro malmulte estimi ol trotaksi la proprajn fortojn. — Jus en tiu ĉi fazo oni anstataŭ la „Mi-ne-povas“-pensacon per la energivekanta impulso: „Guste tial rekte antaŭen!“ Agante tiel, oni baldaŭ spertos la verecon de la vivmaksimo: „Pensante, ke oni kapablas, oni kapablas!“

„Mi ne scias!“

= 20 % de nia sukces-energio

Ĉiu malcerteco estas 80%a malpliigo aŭ reduktado de la ebla sukcespovo kaj fortuzado. Car sen klara celdirekto oni ne povas voli; kaj nenia povo sen volo! Tial estas grave sur tiu ĉi ŝtupo, ne rigardi al supozataj aŭ realaj malfortecoj aŭ baraĵoj, sed koncentri la pensojn kaj la vidon al la celo, fidi la internan forton kaj senhezite marŝi antaŭen. La vojo ĝis nun malluma tiam baldaŭ fariĝos lumplena...

„Mi dubas, ĉu mi povos!“

= 30 % de nia sukces-energio

Tio estas la evolufazo de l'nervoza homo: li sentas, ke li devus kaj kapablas — kaj tamen li ne kapablas. Li emas voli — sed li du-

bas, ĉu li povos. Kaj ju pli li penadas, des malpli li sukcesas. Kial? Dum ni dubadas, nur eta parto de niaj dormantaj fortoj fluas en la kanalon de ĝusta, sukcesiga agado, kaj la plejparto de tio, kion ni dezirus fari, restas nefarita. Cu ekzistas helpilo? Jes, ĝi estas: viaj duboj ne ekhaltigu, sed antaŭenmarŝigu vin. Do: unue dubi, sed tuj poste provi, tiam esperi, poste deziri kaj fine voli, riski kaj agi! Meditadu ne pri la malfacileco, sed ĉiam nur pri la facileco de via laboro aŭ tasko. Per tio vi ĝin faciligos. Kaj samtempe la dubo, ĉu vi povos, cedos al la konvinko, ke vi povas!

„Mi dezirus, ke mi povus!“

= 40 % de nia sukces-energio

La vigligo de la deziro estas kuraĝiga progreso. Car ĉiu deziro povas vekti konformajn volfortojn, se oni nur ne ĉesigas la deziregon. Ni do neniam povas deziri tro multe, ĉar ni ja laŭsperte altiras kaj realigas tion, kion ni fervore kaj obstine deziras. Subkonsciaj leĝoj kaj potencoj kaŭzas, ke pasiaj deziroj fariĝas pensfortoj kaj fine volkaj ag-kapabloj. Ĉiu persiste ripetita „Mi deziras!“ fine fariĝos certa „Mi povas!“ kaj „Mi volas!“

„Mi emas!“

= 50 % de nia sukces-energio

Kiu emas, staras je decidiga vojkruciĝo: Se lian „Mi emas...“ sekvas pli sentforta „... sed mi ne povas!“, li riskas refali al la nulgrado de la „Al-mi-neniu-povas-helpi!“ — Sed se el lia „Mi emas“ kreskas la memfidanta jeso de l'prospero, li suprengrimpos ŝtupon post ŝtupo ĝis la „Mi volas!“ — Sur tiu ĉi evoluŝtupo oni mobilizu memfidon, kuraĝecon, persistemon kaj agemon. Oni ne nur ĝenerale „volu“; estas nepre necese, ke oni ekzakte sciu, kion oni volas, kaj ke oni koncentru ĉiujn pensojn kaj sentojn precize al tiu celo. Ankaŭ estas bona helpilo, agi kvazaŭ oni majstrus la situacion aŭ kvazaŭ oni jam estus atinginta la aspiritan celon. Se ni agadas tiamaniere, ni eltrovos, ke la aferstato jesita aŭ asertita per nia „kvazaŭa agado“ ofte mirige fariĝas realaĵo. Tio tute ne estas miraklo, sed natura konsekvenco de la mobilizo de l'realigvolvo en la fundo de l'subkonscio. — Bonvolu mem provi!

luno brilis tra longaj nubvualoj. Nesuperigebla laceco sentiĝis. Nun dormi devus esti bele. Ho, Thomas Vernon! Sajnis, ke lia vizaĝo rekontenlumis al ŝi el la steloj. Cu li ne sidis supre apud la tablo sur la teraso kaj mansignis? „Thom, ĉu vi vokas?“ Instigite de la kredo en sia interno ŝi levis sin, vidis antaŭ si la florantajn stelbildojn de la nokto kaj paŝis tra la stelbriletanta sorĉaĵo.

„Thom, mi venos!“

Madeleine ne sentis la ondojn, enaktivigis malrapide, vidis la patrinon; Marceline Mignard fingre minacis, sed tuj poste Thomas akceptis ŝin per siaj brakoj.

„Jes, Thom, estas mi... mi venas!“ —

Sia vizaĝo ridetis glorigite, kiam oni trovis ŝin.

„Mi esperas, ke mi povos!“
= 60% de nia sukces-energio

La espero donas al la progres-
emulo la „pli longan spiron“, kiu
al li gajnis la decidigan finan suk-
ceson. Agu do laŭ la konsilo de fi-
lozofa: „Kiam malfeliĉo okazis aŭ
ĉagreno vundis vian animon, tamen
ne ĉesu esperi — kaj fine la realigo
de viaj aspiroj vin feliĉigos!“ —
Kion ni esperegas, tion ni ankaŭ
kapablas krei. Kion ni obstine atenda-
das, tion ni fine manifestigas. Ĉiu
esper-impulso plue kaŭzas, ke la
sama espero kaj emego ekflamis
ankaŭ aliajn animojn por la sama
celo kaj tiel plifortigas nian pro-
pran sukcesforton — ĝis kiam la
espero fariĝis kredo kaj fine real-
aĵo...

„Mi kredas, ke mi povos!“
= 70% de nia sukces-energio

Ĉi tie estas la punkto, kie la ĝusta
volado kaj sukcesado komenciĝas.
Malnova roma sentenco diras: „Oni
povas, ĉar oni kredas povi.“ La sek-
reto de ĉiu sukcesa faro fakte estas
la kredo kaj fido, ke oni povas ĝin
fari, kiel aliflanke malespero kaj
malvido estas la radikoj de ĉiuj
malsukcesoj. Ni ĉiutage povas ob-
servi, ke kredo kaj fido kapabligas
homojn al grandaj faroj kaj formas
ilian plej gravan energifonton. —
En la nuna tempo de l' rekonstrua-

do tiuj memfidantaj kaj sukceskre-
demaj homoj duoble entuziasmigis
la aliajn. Tial ni plenu nin ĉi-
utage denove je tiu kredforto kaj
sukcesfido kaj ni konstante jesu ne
nur nian celon, sed ankaŭ nian
povon!

„Mi povas!“
= 80% de nia sukces-energio

Dirante „Mi povas“ oni scias, ke
la fortoj konformas al la volo. Tial
la sukcesaj homoj de ĉiuj periodoj
kaj landoj nin kuraĝigu! Ni neniam
tro malmulte taksu niajn fortojn
kaj kapablojn! Vi kapablas pli
multe, ol vi supozas. Vi posedas pli
grandan provizon da dormantaj
energioj kaj vekeblaj talentoj, ol
vi scias. Efektive: homo ĉiam ka-
pablas fari tion, kion li volas fari,
se li nur vere kaj ĝuste voladas kaj
jesas sian povon! Klare kompre-
nante tion, ni denove atingis pli
altan ŝtupon de sukcesiga energi-
mobilizo.

„Mi volas!“
= 90% de nia sukces-energio

Ĉiu pozitiva volado liberigas al
si la vojon! Tio estas grava instru-
gajnita dum jarmiloj de l' homa
historio. Mi konscie diris: ĉiu po-
zitiva volado! Nia volado neniam
celu malutilon kaj neniam kaŭzu

suferon al alia homo! Ĉar volante
aŭ aspirante ian negativajon, t. e.,
ion, kio malpliigas fremdan feliĉon,
oni neeviteble ekfunkciigas la tiel-
nomatan „leĝon de renversita
penado“, kiu efikas, ke ni ricevas
ne nur neajn, sed malajn rezulta-
tojn. Nia celo do ĉiam nepre estu
pozitiva, jesa, utila al ĉiuj. Tiu-
okaze nia volo fariĝos la pioniro
kaj realigo de tio, kion ni dezire-
gas, kaj vidigos la amplekson kaj
abundecon de niaj fortoj kaj eble-
coj! Ĉiuj vivspertoj nin instruas, ke
homo, kiu koncentradas sian volon
al pozitiva celo, fine atingas tiun
celon.

„Mi agis!“
= 100% de nia sukces-energio

Akvo varmigita nur ĝis 90 gradoj
ne bolas. Ni devas varmigi ĝin je
100 gradoj. La sama problemo sin
montras rilate al la volforto: ĝi de-
vas atingi tiun „flamig-temperatu-
ron“, je kiu ĝi fariĝas ago. Vera
majstro de l' vivo estas nur tiu, kiu
diras ne nur: „Mi emas“, sed: „Mi
volas“, poste konstante kaj obstine
antaŭenirante, ĝis kiam li atingis
sian celon kaj povas diri: „Mi agis!“,
ĝis kiam do el la volado fariĝis la
faritaĵo!

Bonvolu mem provi tiujn konsi-
lojn en via propra vivo! Vi baldaŭ
ekkonos la verecon de ĉi tiuj in-
struoj. KOS.

Auf dem Büchertisch

Einzelne eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

SVEDA NOVELARO. Tradukis
D-ro F. Szilágyi. Eldonita de Sveda
Laborista Esperanto-Asocio, Stock-
holm, Barnhusgatan 8. Nur binditaj
volumoj. Formato 13 × 19 cm, 235
paĝoj. Prezo 6 sv. kr.

Wie alle in Schweden erscheinenden
Esperanto-Bücher, macht auch diese ge-
schmackvoll gebundene Novellensamm-
lung, auf erstklassigem Papier gedruckt,
einen gewinnenden Eindruck.

Das Besondere dieses Buches ist wohl
darin zu suchen, daß alle zwanzig No-
velles, so unterschiedlich sie auch in
ihrem Inhalt sein mögen, von Verfassern
stammen, die aus der reinen Land- und
Industriearbeiterschicht herkommen, die
also nach üblicher Ausdrucksweise als
„Proletarier“ angesprochen werden könn-
en. Die Themen sind auch wirklich alle
mehr oder minder diesem Milieu ent-
nommen, jedenfalls weichen sie stark
von Novellen ab, die ausgesprochen
„bürgerliche“ Verfasser schreiben. Darin
vor allem liegt ihr Reiz — aber, wie mir
auch bereits ein Leser dieser Novellen
versicherte, „sie sind teilweise düster,
grau, betonen nur allzu sehr die Schat-
ten des Lebens und wirken bisweilen
eintönig“. Zu einem gewissen Teil muß
man diesem Leser sogar recht geben;
aber ist nicht das Leben des einfachen
Arbeiters in drückenden Verhältnissen,
die gleich einer Last ihn am Boden hal-
ten, doch wirklich nur ein graues Einerlei?
Wie die Verfasser dieses Leben
schildern, wie sie seine kleinen Erleb-
nisse darstellen, das läßt uns mit stets
wachem Interesse von einer Novelle zur
anderen weiterlesen. Mich persönlich ent-
zückte die skizzenhafte Novelle „Eto-
liano“, in der Eyvind Johnson uns den
jungen Homer näherbringt, so ganz an-
ders, so grundverschieden von unserer
Auffassung, und doch so ganz natur-
wahr, wie es tatsächlich hat sein können.

Daß jeder Novelle eine kurze, aber
ausreichende Biographie des Verfassers
vorausgeht, hilft sehr dazu, die Eigen-
art des betreffenden Autors zu erfassen.

Die Übersetzung des bekannten Dr.
F. Szilágyi ist bestimmt keine leichte
Arbeit gewesen. Man merkt, wie er sich
mühte, auch in Kleinigkeiten dem Ori-
ginal zu folgen; dabei ergaben sich aber
öfters teils unrichtige, teils schwer ver-
ständliche Bildungen, die — wie auch
die wenigen Druckfehler — durch vor-
heriges nochmaliges Lesen leicht hätten
vermieden werden können. Anderer-
seits ist aber hervorzuheben, daß viele
recht treffende Ausdrücke zu finden
sind, z. B. trudjako (Zwangsjacke), mal-
plivalorkomplekso (Hemmung), lia plej
ena interno (sein Allerinnerstes) usw.

Jedenfalls ist dieses Buch eine wert-
volle Bereicherung unserer Überset-
zungsliteratur. Jfb.

Wir wollen heute einmal einen
Blick werfen in nur zwei Esperanto-
Zeitung, die, so gänzlich verschie-
den sie voneinander sein mögen, doch
jede für sich in bewundernswerter
Art dem Esperanto dient. Da ist zu-
nächst

L' ESSOR de l' ESPERANTO. Diese
alle drei Monate in Paris erscheinende
Zeitung, die den schönen Namen „Auf-
flug, Aufschwung“ führt, befaßt sich in
ihrer zweiten Vierteljahrnummer 1951
mit dem immer und immer mehr aktu-
ellen Thema „Esperanto in den Schulen“.
Sie bietet eine sehr umfassende Zusam-
menstellung der amtlichen Dokumente
und Meinungen zu dieser Frage. Die
wichtige Äußerung des Ministers der
nationalen Erziehung vom 11. 10. 1938
(... si des cours facultatifs d' Espéran-
to peuvent être institués, je n' y verrai
que des avantages = falls wahlfreie
Esperanto-Lehrgänge eingerichtet wer-
den können, sehe ich darin nur Vor-

teile) und der Erlaß desselben Ministers
zum selben Thema vom 16. 1. 51 sind im
Wortlaut abgedruckt. Sehr interessant
und wertvoll sind auch die Meinungen
von Mr. A. Chatelet, Doyen de la Fac-
ulté des Sciences de Paris (... des cours
destinés à familiariser les jeunes gens
et les hommes de science avec la pra-
tique de la langue internationale) und
von Mr. J. Luc, Directeur des Program-
mes de la Télévision Française (...
Croyez-moi, les gouvernements ne mé-
ritent pas d'obstacles à la diffusion
de l'Espéranto = glauben Sie mir, die
Regierungen werden der Ausbreitung
des Esperanto keine Hindernisse in den
Weg legen).

Die ganze vierseitige Nummer, noch
größer als HEROLDO-Format, ist für
die Propaganda unter Lehrpersonen
außerordentlich geeignet. Vielleicht wirkt
sie in Deutschland gerade wegen ihres
überwiegend französischen Textes. Man
bestelle sie bei U.E.F., 34, Rue de Cha-
brol, PARIS (10 e). Einzelnummer 12 frs,
50 St. 300 frs.

Das andere Blatt ist die April-Mai-
nummer 1951 von DIA REGNO, das
internationale Organ der Kristana Espe-
rantista Ligo Internacia = KELI. Sie
feiert jetzt ihr 40jähriges Jubiläum, und
der Vorsitzende ihrer ersten (Gründungs-)
Zusammenkunft während des
7. Internationalen Kongresses in An-
werpen, Ob.-Ing. Paul Hübner, Köln,
beginnt in dem Leitartikel der Num-
mer die Geschichte der KELI zu schrei-
ben. Die achtseitige, auf bestem Papier
sauber gedruckte Nummer enthält wei-
ter interessante Beiträge zur Interkon-
fessionellen Aussprache, über die Unity-
Bewegung, über Judas, biblische Zah-
len und in der Abteilung „Nia lingvo“
über die Tiom-kiom-malsano. In dieser
Frage, so möchte man annehmen, wird
wohl alles unnötigerweise zu sehr auf-
gebauscht. Es ist zweifellos, daß sich
„tiel“ und „tiom“ in manchen Sätzen
bedenklich nahe kommen. Wenn sie
dann schon mal verwechselt werden, so
braucht das noch lange nicht zu einem
kiom-ismo und einer Verletzung des
Fundamento zu führen.

Die Adresse des verantwortlichen Her-
ausgebers von Dia Regno ist: Erik
Carién, Hällabrottet, Svedujo. B.

WIR STENOGRAPHIEREN ESPERANTO

nach dem deutschen amtlichen Einheitssystem

Bearbeitet von Wilhelm und Hans Wingen

Handwritten stenographic notes in German, starting with "Letero pri la deveno de Esperanto".

Handwritten stenographic notes in Esperanto, corresponding to the German text on the left.

Den langschriftlichen Text des obigen Anfangs des „Letero pri la deveno de Esperanto“ finden Sie in: Borel, vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache, 16. Auflage, Seite 79; Dietterle, Originala Verkaro, Seite 417; Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, Seite 22.

EIN WETTSCHEIBEN

in verschiedenen Geschwindigkeiten für Stenographen aller Systeme soll auf dem Münchner Kongreß stattfinden!

Mit der Übertragung der Einheitskurzschrift, die in der Esperanto-Post erschienen ist, lassen sich 120 bis

140 Silben durchaus erreichen. Nur Üben ist natürlich notwendig, und da können wir Ihnen den Tip geben: eine Zeile der EP enthält durchschnittlich 12 Silben! Also 5 Zeilen in der Minute = 60 Silben, 8 Zeilen rund 100 Silben usw. Wer an dem Wettstreiten teilnehmen will, nutze diesen Wink aus; wir wünschen schon jetzt besten Erfolg!

LINGVA KONSULTEJO

Demando 12

Kia diferenco estas inter „kvieta“ kaj „trankvila“? Al mia dispono nur estas la vortaro de B., kiu ne donas informon pri tio. Kion diras Plena Vortaro? K. Sch. G.

Respondo 12

La vortaro de vi nomita tamen donas bonajn difinojn. Vi povas el ili konstati, ke „kvieta“ signifas (seelisch), (innerlich) ruhig, gelas-

sen, (bei Tieren:) fromm, dum „trankvila“ esprimas regunglos, unbeweglich, geräuschlos. Do, la unua rilatas pli la karakteron, dum la dua koncernas prefere konkretaĵojn. Plena Vortaro diras i. a. **Kvieta:** Ne ekscitanta la sentumojn (kvieta nokto, lumo, feliĉo); havanta pacan aspekton (kvieta vizaĝo); nekolerema, malsovaĝa (kvieta besto). **Trankvila:** Agitata de neniaj zorgoj (trankvila konscienco estas bona dormilo; kiu vivas trankvile, vivas facile); senmova (akvo senmova estas akvo danĝera).

Demando 15

Kial — us-formo?

(El recenzo en „Esperanto“, 1951, paĝo 16, meze de alineajo.)

Gi certe ne plidelikatigus la junan menson, kaj elvokus kontraŭon de la bestamanto. Mm.

(Eric Revill: La eta kato, kiu ne volis morti.)

Respondo 15

Estas malfacile diri, kial la recenziinto ĉi tie uzis la us-formon. Eble li volis esprimi sian personan opinion kiel eble plej maltrude kaj tial elektis la kondiĉan modon, eble pro sia angla lingvosento. — Fakte estas, ke la frazo sen aldonita (aŭ almenaŭ alpensebla) se-frazo restas sence nekompleta.

Pri „Malgranda Konkurso“

(EP Nr. 3/51 p. 24)

Kie estis la „kuraĝuloj“, kiuj ĉasis presajn kaj aliajn erarojn en EP? Nur unu sendis je la lasta tago de la templimo poŝtkarton kun tri trovitaj eraroj. Do li gajnis. Estas s-ro Hermann Jackel, Rottenburg/N., Marktplatz 12.

Kvankam estas fiate konstatita, ke EP estas tiom sen-erara, la redaktoro tamen devas konfesi, ke li trovis ankoraŭ kelkajn aliajn erarojn. Sed li kompreneble ne ricevas premieton. Li devus esti vidinta ilin jam antaŭ la preso.

Liber-Socia Rondo

fondiĝis okaze de la lasta Revelotago en Kolonjo. Ĝi celas diskonigi al la Esperantista publiko la prisociajn verkojn de Silvio Gesell. Interesuloj kaj samideanoj dezirantaj subteni la rondon povas sin turni al Liber-Socia Rondo p.a. Bernd Hasecke (22a) Velbert (Rheinl.), Königstr. 26

Internacia Laborkampo

La laborkampo por geesperantistoj, flanko de la Internacia Civil-Helpservo, menciita en la lasta numero, okazos ne en Germanio, sed en Poitiers (Francio). La kampaĉo estos

de 15a de julio ĝis la 25a de aŭgusto 1951.

Por ĉi tiu vasta laborkampo (100 ĝis 150 gepartoprenantoj el 16 landoj, eĉ el Japanio) ni bezonos 20 esperantistajn gevolontulojn por helpi konstrui laboristajn loĝejojn. Do, bona propagandobleco por nia lingvo! Interesuloj skribu tuj al: Alfredo Knaus, Hagelschies 4, Stuttgart-Bad Cannstatt (Germanio). De tie vi ankaŭ ricevos detalan informon pri la laboro de la I. C. H.

Mi volas sendi pere de EP mian plej sinceran dankon al ĉiuj samideanoj en Germanujo, kiuj afable gastigis min aŭ tradukis aŭ organizis miajn prelegojn dum mia trimonata restado. Pro la sukceso de miaj prelegoj mi decidis denove daŭrigi la prelegadon en lokoj de Germanujo, kiujn mi ankoraŭ ne vizitis, post la Munkena kongreso. Mi petas ĉiujn grupojn kaj individuajn esperantistojn aranĝi prelegojn publikajn, grupajn aŭerneajn en gimnazioj, universitatoj ktp. Se tradukisto mankas, mi povas prelegi ankaŭ angle aŭ france. Skribu tuj al

D-ro Tadros Megalli
ĉe s-ro Steiner, Augasse 42
Wörgl, Tirolo, Aŭstrio

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich — 12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl. Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

Wie übersetzen Sie ins Esperanto...

Wie ist die Wettervorhersage?
Torwart
Belichtungsmesser
Soll ich Sie abholen?
Super
Gepäckständer
Sie dürfen es mir nicht abschlagen!

Wissen Sie es? Wenn Sie es nicht wissen, gibt Ihnen

Esperanto in der Tasche

Auskunft über diese u. viele Hunderte anderer praktischer Redewendungen u. Ausdrücke, die Sie in Ihrem Wörterbuch schon oft vergeblich gesucht haben.


1,60 DM zuzügl. 10% Porto u. Verpackung. Durch alle Buchhandlungen oder

Limburger Vereinsdruckerei G. m. b. H., Limburg/Lahn

Kongres-Programo

por la Austria Esperanto-Kongreso 1951 Innsbruck/Tirolo, 28. 7. — 2. 8.

- Kongres-oficejo en la kongresejo „ADAMBRAU“, Innsbruck, Heiliggeist-Straße 16.
31. 7. 1951 (mardo):
9.00 h Kvinna generala kunveno (jarkunveno) de AEF.
20.00 h Komuna vizito al teatro.
1. 8. 1951 (merkredo):
9.00 h Kvinna generala kunveno (jarkunveno) de „Austria Societo de la amikoj al Esperanto“.
14.30 h Jara ĉefkunveno de Esperanto-landestraro por Tirolo kaj Vorarlberg.
Vizito al la tendaro de Esperanto-junularo.
20.00 h Koncerto.
2. 8. 1951 (ĵaŭdo):
Tuttage ekskursoj en la cirkaŭaĵoj de Innsbruck.
20.00 h Adiaŭa vespero „Tirolo salutata“.
Pli detalaj informoj estos diskonigataj ĝustatempe.
28. 7. 1951 (sabato):
14.00 h Fakkunsido de la fervojista fakgrupo de AEF.
20.00 h Agrabla kunesto, honorigo de meritplena fervojistaj Esperantistoj.
29. 7. 1951 (dimaŭno):
8.00 h Katolika Diservo kun Esperanto-prediko.
9.30 h Solena kongres-malfermo.
12.00 h Komuna tagmanĝo.
21.00 h „La kongreso dancas“ (Esperanto-balo)
30. 7. 1951 (lundo):
Antaŭtagmeze kaj posttagmeze okazos fakkunsidoj.
20.00 h Amuza vespero.



Hier entsteht die
ESPERANTO-
POST

und alle anderen Druckerarbeiten, wie wir sie in einer Anzeigen-Serie vorgeführt haben. Eine große Anzahl von gut eingearbeiteten Fachleuten steht jederzeit zur Verfügung, um auf modernen Maschinen schöne Drucksachen zu schaffen. Fragen Sie bei uns an, wenn Sie etwas Gedrucktes brauchen.

Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn